



N-ro 4 - 2006.08.03

Florenca Lilio

KURIERO DE LA 91A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

NI ESTAS DUMIL DUCENT TRI

(lasta listo de aliĝintoj je paĝo 4)

LA DU NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE UEA

Umberto Broccatelli (1931), Italio. Broccatelli esperantiĝis en 1947 kaj tuj ekaktivis movade, estante unu el la refondintoj de Bolonja E-Grupo kaj ĝia sekretario dum kelkaj jaroj. Samjare li aliĝis al Internacia E-Ligo, kiu tuj poste kunfandiĝis kun UEA. Li kunorganizis nacian kongreson en Bolonjo en 1952 kaj la 4a-an UK samurbe en 1955. En 1980 li estis elektita al la Nacia Konsilio de Itala E-Federacio. Li restis konsiliano de IEF ĝis 2005 kaj plurfoje, ĝis 1999, membris en ĝia estraro. De 1989 ĝis 2002 li redaktis la organon de IEF, *l'esperanto*. Li iniciatis la aliĝon de IEF al la Itala Konsilio de la Eŭropa Movado, en kies gvida komitato li poste reprezentis IEF. En 1999 li reaktivigis Eŭropan E-Union, kiun li prezidis, ankaŭ redaktante ĝian informilon *Eŭropa Bulteno*, de 1999 ĝis 2004, kiam li refariĝis honora prezidanto de EEU. Broccatelli aŭtoris la vortarojn *Vocabolario Esperanto-Italiano* (1984) kaj *Dizionario Italiano-Esperanto, Esperanto-Italiano* (2004) kaj la lernolibron *Nuovo Corso di Esperanto, per allievi e autodidatti* (1993). Li multe artikolis pri lingvaj demandoj de Esperanto, pri kiuj ankaŭ lia broŝuro *Esperanto, lingvo planebla* (1996) kaj pri eŭropaj aferoj. Li prizorgis la E-eldonon de la gazeto La partio Nova de Transnacia Radikala Partio. Broccatelli tradukis ankaŭ beletraĵojn, i.a. por *Itala antologio* (1987).

Prof-ro d-ro Otto Haszpra (1928), Hungario. Haszpra estas emerita profesoro de la hidro-konstrua katedro de la Teknika Universitato de Budapeŝto, eksperto de UN, membro de la Hungara Akademio de Sciencoj. Liaj sciencaj publikaĵoj nombras ĉ. 300 en sep lingvoj. Haszpra lernis Esperanton en 1958. Li estas membro de Hungaria Esperanto-Asocio ekde 1962 kaj servis ĝin kiel komitatano (1965-1990), estrarano (1977-1990) kaj vicprezidanto (1981-1990). Li estas fakdelegito de UEA pri inĝenierado ekde 1972. Li estis komitatano de UEA (1980-1990) kaj estrarano pri faka agado (1986-1989). Ekde 2004 li membras en la Akademio de Esperanto. Haszpra estis redaktoro de *Sciencaj komunikaĵoj* (1974-1979) kaj gvidanto de Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto (1981-1985). Li aperigis multe da sciencaj kaj popularsciencaj artikoloj en Esperanto kaj ofte prelevis. Li kunlaboris por la 6-lingva *Geodezia fakvortaro* (1976-1981) kaj por *Hungara-Esperanta meza vortaro* (1996). En 2000 aperis lia ampleksa E-lernolibro por hungaroj. Haszpra aŭtoris la *E-dokumenton Esperanto-lingvo de natursciencoj kaj tekniko 1887-1986* (1988) kaj studojn *La vera kosto de la multlingveco* (1978), *La natura ŝarĝo de la lingvolernado kaj ties radikala kosto de la malpliigo* (2002), *Egalrajteco kaj ekonomieco en la internaciaj rilatoj* (2005).

MONTRANTE LA KONGRESAN INSIGNON

oni rajtas eniri SENPAGE en la ŝtatajn Muzeojn de Florenco (interalie: Uffizi, Accademia, Palazzo Pitti, Bargello, Cappelle Medicee, San Marco, Orsanmichele, Palazzo Davanzati, Cenacolo di Ognissanti, Cenacolo Andrea del Sarto, Cenacolo di Fuligno, Cenacolo di Sant' Apollonia, Chiostro dello Scalzo) kaj PER RABATITA PREZO (de 1 ĝis 3 eŭroj) en la Komunumajn Muzeojn

GRAVE! Oni perdis du kap-aŭskultilojn utiligatajn dum ekskurso D3-Uffizi Galerio (la 29an de julio kaj la 1an aŭgusto). Tiuj kiuj retrovis ilin estas petataj porti ilin ĉe la giĉeto ekskursoj.

RAPORTO PRILAMEDICINISTAKUNVENO - Marde, la 1an de aŭgusto en salono Migliorini kunvenis 46 gekolegoj el 17 landoj. D-ro Imre Ferenczy prezidanto de UMEA gvidis la kunvenon. Li raportis pri la agado de la Asocio. Antaŭnelonge aperis grava verko Esperanta-Angla medicina terminaro. La aŭtoro estas japana profesoro d-ro Saburo Yamazoe, nun 98-jara. S-ino Katarina Farago (H) raportis pri la ĵus okazinta 4-a Eŭropa Medicina Esperanto-Kongreso, kie ĉeestis 80 personoj el 7 landoj. Kadre de la jarkunveno dro L. Molnar prelegis pri la Pasiva antitumora defenda sistemo. UMEA festos sian 100-jaran fondiĝdatrevenon en jaro 2008. *Raportis d-ro I. Ferenczy, KN 040*

En Salono "Stoppoloni" okazis (1.8) ĉefkunveno de **IPTEA**. Vicprezidanto Draguško Petrov, tra legis detalan raporton okaze de 60a jubileo de la asocio. Pri la raporto debatis s-ro Marcel Delforge (B), s-ro Piliponis (LT) kaj Inumazu Fumio (J). Post la jubilea raporto estis elektita nova Estraro de la Internacia Poŝtista kaj telekomunikista Esperanto Asocio (IPTEA). *Raportis Draguško Petrov, KN 463*

ĪEKUMENA DISERVO - Pli ol 400 gekongresanoj kolektiĝis dimanĉon posttagmeze en la preĝejo sankta Laŭrenco por ĉeesti la Ekumenan diservon. Ĉi-tradician eron de la UK-oj ĉi jare gvidis S. Hawkes Teeple, B. Eichkorn kaj G. Berveling. Tuj post la ekumena diservo sekvis la dimanĉa meso kiun kuncelebris kvin katolikaj pastroj ĉeestantaj en la kongreso.

KUNSIDO DE IKUE-KELI - Kristanaj esperantistoj havis eblecon ankaŭ dum ĉi UK kunsido, informiĝi kaj pridiskuti la nunan kaj estontan agadon. G. Berveling prezentis la projekton pri la traduko kaj eldono de la tuta Biblio en esperanto. B. Eichkorn informis pri aliaj eldonaj projektoj kaj reatentigis pri la "perlo de la E-literaturo" ekumena preĝ- kaj kantlibro ADORU. M. Beloŝeviĉ kaj C. Sarandrea prezentis la agadon de IKUE, inter kiuj oni aparte devas substreki la ĉeeston de IKUE en la 2a Tutmonda kongreso de la ekleziaj movadoj kaj novaj komunumoj okazinta komence de junio en Rocca di Papa. La ĉeestintoj en la kunsido ankaŭ havis eblecon aŭdi pri la ĉi jara IKUE kongreso okazinta antaŭ tri semajnoj en Velehrad (CZ) kaj pri la venontjara Ekumena Esperanto-Kongreso en Pelpin (PL).

Okazis la kunveno de M.E.L., Muzika E-ligo. Elektiĝis nova estraro: Alan Bishop, prezidanto; Jennifer Bishop, sekretario; J. de Cus Heros, redaktoro. Honora membro: Da vid Goines, komponisto. La kotizo de 5 EUR pageblas al UEA-konto de M.E.L. por abono de gazeto.

En la prelego pri "**Sanigo per spiritaj fortoj laŭ la instruo de Bruno Gröning**", d-ro med. Dözl Müller prezentis la saniĝon de pli ol 30-jara virino de denaska malbona aŭdkapablo. La aŭdolinio faritaj antaŭ kaj post la saniĝo klare montris la ricevon de la plena aŭdkapablo ambaŭflanke. La efikon de la spirita sanigoforto d-ro Dözl Müller komparis kun la homeopatio. Detlev Meier raportis pri la saniĝo de perturboj de la manĝkutimo kaj deprimoj. Helpe de lora instruoi de Bruno Gröning li evitis la pensiuliĝon en aĝo de 32 jaroj. Harald Hombach ricevis saniĝon de dorsdoloroj, kies staton eĉ faklinikoj pri doloroj ne povis plibonigi. Krome Gerharel Schäffler raportis pri saniĝo de astmo. Ripetoj de prelego estos ĵaŭdon kaj vendredon je 9h00 en salono Stoppoloni.

Delegacio de la kongreso estis akceptita ĉe la **Urbodomo** "Palazzo Vecchio", en Salono "dei Cinquecento", mardo je la 18a. Dum la ceremonio, sub la mirinda freskoj, okazis interŝanĝo de bondeziroj kaj donacoj kun la esperantistaj reprezentantoj de la urboj ĝemelitaj kun Florenco: Kievo, Kioto kaj Sidnejo.

Mesaĝo de la urbestro de Kioto al la urbestro de Florenco

Altestimata sro Leonardo Domenici, urbestro de Florenco

Kara s-ro Domenici, mi ŝatas esprimi sinceran dankon pro via kunlaboro por niaj ĝemelurbaj amikecoj.

Al mi estas granda plezuro sendi salutmaeaĝaon al vi kaj al la urbanoj en Florenco okaze en la vizito de la delegacio de Kioto-Esperanto-Societo.

Kioto-Esperanto-Societo estis fondita en 1974 kaj efike disvastigas Esperanton kiel internacian komunan lingvon por paco de la mondo per la partopreno ne nur en kulturaj eventoj de Kioto, sed ankaŭ per interŝanĝo tra la urboj de la tuta mondo, inkluzive de niaj ĝemelaj urvoj Prago, Zagrebo kaj aliaj.

La delegacio vizitos vian urbon kiel partoprenantoj el Japana-Esperanto-Instituto al la 91a Universala Kongreso de Esperanto. Mi aŭdis, ke la kongresa temo estas "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo" kaj en la programo okazos speciala kunveno de ĝemelaj urboj de Florenco. Tial la delegacianoj esperas interamikiĝi por niaj du urboj.

La kulturaj kaj internaciaj interŝanĝoj inter ambaŭ urboj havas gravan signifon por internacia bonvolo. Tial mi ŝatas peti vin pri via bona subteno al ilia aktivado por plua pliboniĝo en niaj ĝemelurbaj rilatoj. En la fino mi esprimas al vi mian deziron por via bonfarto kaj kontinuan prosperon al via urbo. Sincere via, **Yorikane MASUMOTO**, urbestro de Kioto

RAPORTO de la LINUKS-UZANTOJ KUNVENO. Ĝi okazis lunde matene en Salono Stoppoloni, alvenis pli ol 30 personoj Ni diskutis pri la nova estonta asocio LUG-ESPERANTO (Tutmonda Esperanta Asocio pri Libera Programaro), Ni unue fine de aŭgusto kreos dissendoliston kaj tuj poste portalon. Ni ricevis subtenon de reprezentanto de FLUG (Firenze Linux Users Group), s-ro Finori, kiu persone alvenis en nia salono. Post interesaj intersanĝoj, ni finis la kunveno per foto kun reprezentanto de FLUG, kelkaj ĉeestantoj, kaj Prez. Corsetti. Kontakto pri tiu asocio estas provizore ĉe: lug-esperanto@orange.fr

Kunsido pri Landa Agado

Pli ol 40 esperantistoj, kaj inter ili, reprezentantoj de landaj asocioj kiel Danlando, Finnlando, Kroatio, Japanio, Kubo, Nederlando, Rumanio kaj Svedio, partoprenis la kunsidon pri landa agado por pritaksi nunajn fortojn kaj mankojn rilat la agadon de la movado en la ĉefaj agad-direktoj de la movada laborstrategio. Oni konstatis la bezonon plikonsciigi la landajn organizojn sendi reprezentantojn al tiu ĉi grava kunsido kaj pledis por pli da kunlaboro en la concernaj organizoj, revarbado de iamaj membroj kaj pli da integriĝo en la socio per partopreno en eksterasociaj aktivajoj, k.c.

La diskuto estis vigla malgraŭ ne ĉesto de pluraj formalaj reprezentantoj kaj konfirmas la validecon de tiuj ĉi kunsidoj, kiuj devas ricevi pli da subteno de landaj kaj lokaj reprezentantoj.

Raportas M. Gutiérrez - KN 76

Kongresa Limeriko

Simbol' de kongres' en Florenco:

la eta David' sen potenco

venkanta giganton.

ĉu ne Esperanton

ektrafos la sama tendenco?

Otto Prytz - KN 732

Invitoj

Ĵaŭdon, la 3an de aŭgusto, Salono Minnaja, 9h00-9h45: Hinda kontribuo al la mondo de scienco kaj matematiko. Antikvaj hindoj estis famaj en ĉiuj bazaj sciencoj kiel matematiko, astronomio, botaniko, anatomio, kemio, medicino ktp. Ĉi tiu prezento de Manjula Devi, direktorino de la I.T.I. Centra lernejo en Bangaloro (Hindio) klopodos disvastigi la scion de hindoj kun la monda frataro

Helpu al EEU-agado: Sendu poŝtkarton al via EU-parlamentano! - La estraro de EEU petas EU-loĝantojn pri jena “desubisma” agado, kiu povus re-levi la konscion ĉe EU-deputitoj pri Esperanto. Ĉiuj EU-parlamentanoj ricevis ankaŭ ĉi-jare inviton al ĉi-jara 91-a UK. Venis bedaŭrinde neniu. Por daŭre konsiigadi la parlamentanojn pri Esperanto, EEU-estraro petas vin ĉiujn: sendu al via parlamentano (prefere tiu, por kiu vi voĉdonis) poŝtkarton de la Kongreso, kun simpla teksto, kiu povus esti simila al: *Saluton el **Universala Kongreso de Esperanto**, okazanta en Florenco inter 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006. Venis ĉ. 2200 homoj el pli ol 60 landoj. Ni bone kaj kore pasigis kune la tempon. Vi mankis al ni. XY (propra nomo) - via voĉdoninto.* La adresaro de ĉiuj parlamentanoj troveblas en subteretaĝo (ejo “**Giĉetoj**”), je la informtabulo kaj sur unu tablo de la giĉetoj samloke. PS: Septembre ricevos ĉiuj EU-parlamentanoj de EEU foto-mozaikon de UK (por tiel daŭre kaptadi ilian atenton kaj memori ilin pri la “artefarita” lingvo.)

ITALOJ: ATENTU! - Ĉiu italo aliĝinta al la 91a UK kaj ĉeestanta en Florenco ekde 2006-08-01 ricevas donace tre interesan DVD: ĝi utilas kaj por informado pri Esperanto (en pluraj lingvoj) kaj por kleriĝo lingva (ĝi enhavas plurajn vortarojn, kursojn, gramatikojn, lernilojn plej diversajn, kanzonojn, ktp). La italoj povas ricevi sian kopion ĉe la giĉetoj kie ili ricevis la kongresajn dokumentojn.

FKEA - Franca Katolika Esperanta Asocio planas pilgrimon al Sankta Jakobo de Kompostela, julio de 2008, kiel plej eble videbla manifestacio por Esperanto. Petu informi de KN 597

Korekto: UNIKOM serĉas kunlaborantojn por ĉiuj lingvoj, krom tiuj menciitaj en la kongresa kuriero nr. 1.

Bildoj por Florenco. Post la prezentoj dum la UK'oj en Prago kaj Gotenburgo, Franz-Georg kaj Rita Rössler pretigis por la nuna kongreso diversajn bildseriojn omaĝe al Florenco, kun aldono de aliaj bildoj precipe pri Italio. La kolekto nomiĝas “Ja en mi / Itali”. Pro neebleco ekspozicii la bildojn, la pentristoj kreis KD-on kun ĉiuj artaĵoj, kiun ili liveris al Osmo Buller por la Biblioteko Hodler kaj por atentigi ke ankaŭ bild-arto ĉeestas inter la kongresanoj. Aliaj bildoŝatantoj povas ricevi la KD-on postkongrese. Ili senhezitu petu ĝin al la homoj malnataŭ la KN'oj 800 kaj 801.

En vendredo je 15h00-16h15 en Salono Lapenna okazos **aŭkcio**, kies gvidanto Humphrey Tonkin ĉiufoje faras el ĝi aranĝon pireteknike spektaklan. Kvindek da libroj k.a. objektoj, inter kiuj multaj raraĵoj, atendas novan posedanton. Se mankas al vi “Tra la Esperanta Literaturo” de pastro Giambene kun lia aŭtografo el la jaro 1907 aŭ numeroj de “Roma Esperantisto” el 1908, jen okazo akiri ilin. Kaj kiu estus pli trafa loko por aĉeti la unuan E-romanon verkitan de virino, “Lilio” de E.A. Sinnotte, ol Florenco? La spektaklo kulminos en la konkurso pri kongresnumero 1 de la 92a UK en Jokohamo.

INTERNACIA ARTA VESPERO - Ĉiuj artistoj, kiuj ricevis jesan respondon pri sia propono lunde, venu vendrede je 14h00 en salono Zamenhof por provludi. (Salono Zamenhof en la fortikaĵo). Tio same validas por Marĉella Fazani, Jean-Thierry von Büren, Julian Hernandez, Andrei Korobejnikov, Vida Jerman, Ĵomart kaj Nataŝa kaj Carina. *Mireille Grosjean helpanto por IAV (kn 291)*

Junuloj malpli ol 30-jaraj kapablaj dum 10 minutoj pritrakti unu el la temoj indikitaj en la KL paĝo 56, sen antaŭpreparita teksto, estas invitataj partopreni en la

ORATORA KONKURSO

kiu okazos vendredon de 9h00 ĝis 10h45 en Salono Canuto. Akceptu la defion, anoncante Vin al Claude Nourmont (KN 79)

Leteroj

Gratulon al la redaktantoj kaj kontribuantoj de la “Kongresa kuriero” - ĉi-jare “Florenca Lilio” – kiu, pere de mi, vaste diskonigis tra la mondo pere de la reto. Jam centoj da e-istoj legas ĝin, samkiel la informojn pri la prikongresaj raportoj de Radio Polonia kaj Ĉina Radio Internacia (ĉi-lasta aperigis ankaŭ fotojn pri la kongreso). La informojn pri la kongreso en Florenco mi liveris pollingve al ĉ. 20 polaj ĵurnalistoj (miaj personaj konatoj) kun citaĵoj el la parolado de Ludoviko Zaleski-Zamenhof. Kion ili efikos mi ne scias, sed mi rekomendas, ke kompetentaj ĵurnalistoj provu atingi siajn geakolegojn per nacilingve prilaboritaj kongres-informoj, kiujn oni povas ĉerpi ĝisdate el la kongresaj kurieroj, Radia Polonia kaj Ĉina Radio Internacia(*). Gratulon! Daŭrigu kaj ni niaflanke utiligos ĉion! La aŭskultantoj de radiostacioj uzantaj Esperanton tutspeciala atendas raporton pri la konkludoj dela renkontiĝo de la aŭskultantoj, kiu okazis, sed pri kiu ĝis nun ne aperis raporto en la “Lilio”. **Andreo Pettyn, iama estro de la E-elsendoj de Pola Radio**

(* eblas ankaŭ ĉerpi informojn el www.uk2006.info/rassegnastampa, kolekto de gazetaraj depeŝoj kaj publikigitaj artikoloj, prizorgata de la gazetara servo de la 91a UK (gvidata de Bruĉjo Kasini).

Dankon pro viaj kurieroj, kiuj donas al ni, kiuj ne povas partopreni en la kongreso bonegan informon pri okazajoj dum la UK. Mi deziras daŭran sukceson en viaj laboroj. Kore salutas vin, **Aira Kankkunen**

Karaj, dankon pro la belaj Lilioj, kiujn vi ofertas ankaŭ al ni neĉeestantoj! Kuraĝon al vi, spite al la tempo-premo kaj la teknikaj problemoj... **James Rezende Piton**, ĉefdelegito por Brazilo, kunordiginto de “La Bela Sono de l’Omaro”, kuriero por la 87-a UK en Fortalezo

Mi serĉas esperantistojn kiuj okupiĝas pri pentroarto (pentristoj, grafikistoj, galeristoj). **Adam KN 1845**

lastegaj aliĝoj

2188		S-ro Péter Hompasz, Wesselényi u. 2, 9700 Szombathley, Hungario
2189		S-ro Giorgio Bonfico, Via San Marco 93, 35129 Padova, Italio
2190		D-ino Judit Horváth, u. 2, 9700 Szombathley, Hungario
2191		S-ino Kudo Madoka, 2504-3-201, Kamitsu-machi, Kurume-shi, Fukuoka 830-0052 Japanio
2192	tlpi-w	S-ro Tobe L. Pittman, Usono
2193	pase-t	S-ro Patrick Segur, 33, rue Galilée, 75116 Paris, Francio
2194	didi-h	S-ro Dietrich Michael Weidmann, Akazienstr. 6, Poŝtfako 58, 8034 Zurich, Svislando
2195		S-ino Nelida Weidmann, Akazienstr. 6, Poŝtfako 58, 8034 Zurich, Svislando
2196		S-ino Marie Bellemare, 1445 Locwell #2, Québec QC IRIV6, Kanado
2197		S-ino Irina Gerasimova, Krasnaja 4/2 Gurzuf, Yalta, Ukrainio
2198		S-ro Antonio Moreira Filho, R. Pinheiro de Azurara 87, Parque São Rafael, São Paulo 08311-220, Brazilo
2199	nen-h	S-ro Neven Kovačić, 85, avenue Huart-Hamoir, 1030 Bruxelles, Belgio
2200	vgnd-o	S-ro Laurent Vignaud, 3 allée du Haras, Appt. 132, 49100 Angers, Francio
2201	ueli-f	S-ro Ueli Haenni, Linckweg 2, 3052 Zollikofen, Svisio
2202		S-ino Simona Rossi, Linckweg 2, 3052 Zollikofen, Svisio
2203		S-ro Stefan Goes, Ruitingenstraat 8, 8400 Oostende, Belgio

Aĉetu ĉe la libroservo la eldonaĵojn kiuj aperis premiere dum la nuna UK:

Esenca lernolibro de la itala lingvo Guerra edizioni - Marco Mezzadri - tr. Davide Astori kaj aliaj

Gvidlibro pri FLORENCO - El gvidlibro de T.C.I. - tr. Pier Vittorio Orlandini La aŭtoro

Ksenofobia gvidlibro al la italoj IEF - Martin Solly - tr. Anna Lowenstein

La Malemuloj Edistudio - Giovanni Verga - tr. Giancarlo Rinaldo


La princo IEF - Nicolò Macchiavelli - tr. Carlo Minnaja

La gefianĉoj IEF - Alessandro Manzoni - tr. Battista Cadei

Le radici culturali dell'esperanto Il segno dei Gabrielli - Comenio - red. Giordano Formizzi

ĉu parencoj?

Francesco Maurelli KN 97
kaj Ho Chi Minh



Por kontakti la redakcion:

- Vi povas VENI al la Gazetara Servo, en Salono Fighiera-Sikorska, teretaĝe, en la kongresejo;
- aŭ Vi povas SENDI retpoŝtan mesaĝon al adreso: <kontaktu-lilion@yahoo.com>
- aŭ Vi povas TELEFONI al itala poŝ-telefono: (+39) 338 860 20 84. Al ĝi Vi povas sendi ankaŭ SMS'n.

Por la realigo de ĉi tiu 2a Lilio, kunlaboris
Giovanna Licciardello, Carlo Sarandrea kaj
Marija Belošević

Eŭropa Klubo kaj AIS invitas partopreni en modeleksperimento.

La filozofi-profesoro d-ro Johannes Heinrichs, vicprezidanto de Eŭropa Klubo, argumentas en germanlingva libreto pasintjare aperinta por subdivido de la parlamentoj en kvar ĉambrojn respondecaj respektive pri financoj kaj ekonomio, pri juro kaj regiona strukturigo, pri lingvo kaj kulturo kaj pri bazaj valoroj kaj mondkonceptoj.

Pasintjarfine en Trier (dum IF 23) la estraroj de Eŭropa Klubo kaj de AIS decidis kune realigi dum 2006 kaj 2007 modeleksperimenton pri la funkciado de tia ĉambro respondeca pri la lingvopolitiko kaj kulturpolitiko sur la nivelo de la Eŭropa Unio. Oni ekkolektis jam kandidatojn el ĉiuj nunaj kaj antaŭvidataj EU-landoj (el „Eŭropio“) kaj iniciatis interretan diskuton pri estonta laborregulato.

La modelparlamento konstituiĝos la 3an de septembro 2006 en Komarno (SK) fine de la 29a Sanmarinea Universitata Studadsesio (SUS) de AIS.

La elektoj okazos rete el inter la eŭropiaj membroj de la portantaj organizoj. EK kaj AIS invitis jam individue aliajn organizojn apogantajn neŭtralan lingvopolitikon por EU, precipe EEU-n, fariĝi kunportantoj de la eksperimento.

Bonvenaj estas la kunlaboro ankaŭ de ne jam invititaj tiaj organizoj – kaj la kandidatiĝo de membroj el ili.

Informas EK-vicprezidantino kaj AIS-vicsenatanino Prof.Dr.Polakova (KN 1533), kiu momente preparas SUS 29. Frank, KN 140.